**B U L T E N O** DE

LABORISTO LIGO ESPERANTISTA EN ĈEĤOSLOVAKIO

JARABONO POR ČSR Kč 6,- POR EKSTERLANDO 4 RESPONDKUPONOJ POR MEMBROJ DE UNUIGITAJ LIGOJ "L.L.E." PLZEŇ KAJ "Č.L.A.E." ÚSTÍ N/L: SENPAGE.

POŜTĈEKA KONTO DE L.L.E. PLZEŇ 87.136 PRAHA DE Č.L.A.E. AUSSIG A/E: 45729 PRAHA

ADRESO LABORISTA LIGO ESPERANTISTA, PLZEŇ, PEKLO ČSR

12a jarkolekto. M a j o 1938. nro. 5

## M A J A K A N T O

Emba.

Je frua mateniĝo maja,
Sur la Nigra kampa tero,
Sin sternas verde infan-june
La koloro de l´espero.

Je frua mateniĝo maja,
Feste termas nia koro,
La suno sklave grimpos supren
Sed ekhaltas la laboro.

Je frua mateniĝo maja,
Rave sonas himnaj kantoj;
En kuraĝoga ĉirkaŭpreno
Kantas brunaj geamantoj.

Je frua mateniĝo maja,
Se aŭroro nubojn fendas;
Kun vangoj ruĝaj belestantaj
Mil – milope ni atendas.

Je frua mateniĝo maja,
Ni memoras pri mizero,
Ekŝajnas sarga nia jugo
No sopiras al libero.

Je frua mateniĝo maja,
En la sana freŝaero;
Matura iĝas nia volo
Al batalo por libero.

Je frua mateniĝo maja,
Per giganta fera forto;
Titane ŝiros ni la ĉenojn
Spite al la vivo, forto.

Je frua mateniĝo maja,
En la alt´ la celo palas;
La voj´ kondukas tra mil baroj
Sed ni marŝas kaj batalas.

Je frua mateniĝo maja,
Ni atingas la montpinto;
Kaj sub aŭroro venko – ĝoje
Rekviemos la pasinto.

## Zamenhofa saĝo

Se eĉ la tuta mondo bruos pri nia afero, se nia afero brilos en ĉiuj publikaj lokoj, sur ĉiuj ekspozicioj de la mondo ktp., sed la nombro de la personoj kiuj ellernas kaj uzas nian lingvon, ne kreskor – tiam ni malgraŭ la ŝajna potenco devos deri, ke nia afero mortis, ke ĝia lumo baldaŭ astingiĝos, kiel la lumo de minuta meteoro; sed se eĉ la tuta mondo silentos, se ĉiuj obstine kovros antaŭ ni la okulojn kaj orelojn, se nia afero-longe ankoraŭ restos tute nekonata en la plej granda parto de la mondo, sed se la nombro de la esperantistoj regule se eĉ malrapide kreskados – ni povos kuraĝe diri, ke ni regule progresas, ke ni regule iras antaŭen kaj ke la estonteco apartenas al ni.

E. Esperanto 1892.

Pelita en la MORTON! El Arbeider Esperantisten, Norvegio.
/ fino /

. . . . . . Nia prezidanto kaj delegito de I.E.L. persono informiĝis ĉie kaj venis al frapanta kaj tre malĝojiga rezulto. Nome, Karl Cerjak jam ne plu vivas. "Ni tre petas vin ke vi bonvolu tuj pri tiu malĝojiga fakto informi lian edzinon, kiu eble ankoraŭ esperas ricevo vivsignon de sia edzo". Laŭ sciigoj, kiujnricevis la osijeka grupo montriĝis, ke K.Cerjak sin mortigis jam antaŭ 3 monatoj. Eltranĉaĵo de jugoslava gazeto "Hrvatski list" montriĝis kelkaj detaloj: - sur loko de tragedio ili konstatis ke homo pendis surbranĉe en ĉemizo kaj apud li kuŝis liaj jako kaj ŝuoj. - Krome ili trovis en la jako labolibreton eldonitan de la metiista organizo en Zagreb 1a 3/11 37. el kiu oni trovis pri li div. informojn. En la monujo oni trovis monerojn de 75 paraoj kaj oran edziĝringon de lia edzino kaj leterojn. "Inter la leteroj oni trovis nun kun surskribo "Mi petas malfermu". Ĝi estas adiaŭa letero sen adreso kaj komencas jeno: "Je la tago de mia morto la 18an de septembro /?/ Pri la kaŭzo de sia memmortigo li nenion mencias, sed diras ke tion scias lia edzino. - La kadavro estis tiom longe pendanta en la trovloko /arbaro/ ke de-sur lia vizaĝo jam defalis la karno kaj la blankaj estoj estis videblaj, vidiĝis ankaŭ postsignoj de birdaj atakoj. - - - -

La jugoslava esp. grupo daŭrigas sian leteron jene"
El la aldonita karto direktita al vi flanke de s.ino Cerjak en Munch en la 2.X.1937 ni vidas ke ŝi ankoraŭ nenion scias pri sia edzo. El la teksto de la karto ni vidas ke ŝia edzo anoncis sin en Osijek la 17an de IX. Nome unu tagon antaŭ sia sinmortigo. Ĉe la polico oni montris al nin prezidanto liajn trovitajn objektojn, monujon, dokumentoj, ringon kaj nomitajn leterojn skribitajn germanlingve. Krome du poŝtkartojn de lia edzino el Munchen per kiuj ŝi petas informojn pri sia edzo. - - Nia prezidanto riproĉis ĉe la oficisto ĉar la polico ne informis lian edzinon pri la akcidento se ili posedis la plenan adreson al ŝi. Ili diris ke la polico ne. devas respondi je privataj letroj. Se ŝi estus petinta informojn pere de la konsulejo ili certe informus ŝin kaj resendis trovitaĵojn. - - Estas interese ke la police asertis ke la mortinti estis "komunisto" pretekstante tion el la teksto de lia letero en kiu li skribis kelkajn vicojn kroate, blasfemante la riĉulojn kapitalistojn ktp. eble pro tiu kaŭzo la police ne trovis "inda" skribi ion al danĝera persono "edzino de komunisto". Nun ni esperantistoj riparos ĉion kaj skribas al vi por ke vi povu fine komuniki al Ema Cerjak la tragedion de ŝia edzo.
Estas al ni vere malagrable doni tiajn informojn, sed ni konsideras nia devo respondi fidinde je viaj demandoj tiel irĝe necesaj por la malesperanta virino.
Esperanto ke ni bone faris nian samideanan devon kaj helpis al vi sufiĉe laŭ kio vi povas informi s.inon Cerjak pri la tragedio, kaj ĉar la afero jam finiĝis, sendi al ŝi konsoligan leteron. - - - - -
Bonvolu akcepti nome de osijekaj samideanoj kaj de nia societo la esprimojn de nia altestimo: /subskriboj/ -

La ĉi supro priskribita okazintaĵo montras al ni ke Esperanto ne estas ia amatora ludaĵo. Por ni, laboristaj esperantistoj ĝi estas ege grava ilo en la batalo kontraŭ la internacia faŝismo. Por ĝi kaj nia proleta korespondo internacia ni sentas nian apartenon al ĉiuj en mizero kaj milito atalantaj proletoj de iaajn haŭkolero. Ĉe ni ne ekzistas diferenco inter "judo" kaj "greko".

- - - - - - - % % % % % % % - - - - - - -

Pensero: Saĝulo konas malklerulon ĉar li mem estis malklera;
sed la malklerulo ne povas ekkoni la saĝulon, ĉar neniam li estis saĝa.
Persa.

G e k a m a r a d o j !

Tagoj 6an kaj 7an de aŭgusto estas fiksitaj por tutlanda esperanta kongres en Plzeň. La celo de la kongreso estas unue, reciproka interkonatiĝo kal serĉi la vojon al ebla kunlaboro. Dua celo estas super amasa kolektiĝo de esperantistoj altiri intereson de ne esperantista publiko kaj konvinki ĝin, ke Esperanto estas nepre la sola lingvo per kiu oni povas interkompreniĝi en la tuta mondo. Tial estas tre neceso, ke ĉiu ĉeĥoslovaka esperantisto ĉeestu la kongreson. Unuopaj eĉ amasaj aliĝoj direktu al L.L.E. Plzeň-Peklo.

Ekde 1a 26a juni ĝis 15a septembro okazos en Plzeň Laborista ekonomia kaj industria ekspozicio, kiun partoprenos kelke da miloj civitanoj ĉeĥoslovakaj eĉ eksterlandaj. Tial estas memkompreneble, ke eĉ ni esperantistoj la ekspozicion vizitos plejnombre, kio povas okazi dum la tagoj 6. kaj 7. de aŭgusto.

Kial Esperanto en Č.S.R. ne povas elvoki en la publiko tian resonon kian ĝia graveco meritas, estas kulpo de ĝia organiza malunueco. Estas tial neceso, por ke ni kiuj propagandas unuecan lingvon rovu la vojon al unueca tutlanda organizo de tiuj, kiuj la lingvon parolas. Ĉi unuecon ni atingos nur tiam, kiam ni socialistaj laboristaj esperantistoj influos niajn gekamaradojn, ke ili lernu Esperanton kaj venu inter ni. Ĉio kie troviĝas kelke de gekamadadoj ekfunkciu kursojn kaj penu tiel disvastigadi lingvoscion. Krom kursoj organizu konversaciajn rondojn kaj gajnu membrojn por LLE. Kie estas favoraj kondiĉoj fondu la grupon.

Plej bona propagandilo por esperanta movado inter la laboristaro estus bona ĉeĥo-esperanta presita gazeto. L.L.E. en Plzeň decidis eldonadi tian gazeton ekde 1. januaro 1939. Komence kvaronjare kies prezo ne estus pli alta ol 1.50 Kč.
Por ke tiu decido realiĝu necesas, ke ĉiuj laboristaj esperantistoj gajnu jam nun inter gekamaradoj, indiferentaj, eĉ inter ne esperantistoj, por nia gazeto abonantojn. B a š a .

- - - - - - % % % % % % - - - - - -

Raporto pri la XVIIa ĝenerala jarkunveno de LLE. Plzeň.

La XVIIan ĝeneralan jarkunvenon, kiun partoprenas plejparte delegitoj el plzeňaj sekcioj malfermis per mallonga antaŭparolo k-do Pech, salutante la partoprenantojn kaj sememorante ĉiujn mortintajn gekamaradojn. En sekvonta prezidanta raporto klarigis k-do Pech la nuntempan situacion de nia ligo kaj de tutlanda esperanta movado.
Eltiro el la raporto de sekretario k-do Jonák: Akceptaj kaj forsenditaj estis entute 246 da leteroj kaj ca 1200 da presaĵoj, krom la monata ekspedo de liga "Bulteno". Pere de "Dělnická akademie" en Plzeň estis aranĝita skriba kurso "Esperanto" estis eldonita en la kvanto da 320 ekzemploj. La mauricoj por "Bulteno" kaj germanlingva folio skribis -kdo Schiller el Varnsdorf kaj plimultigadon kaj ekspedadon prizorgis gek-doj Jonák el Plzeň. En ĉeĥlingva teritorio ni varbis novajn anojn, sed en germanlingva teritorio ni pli multe da anoj perdis, kaj tial estas nunjare malkresko de preskaŭ 50 anoj. La sekretaria raporto estis unuvoĉe aprobita.

Raporto de liga kasisto k-do Rejter

| Enspezo: | | Espezo: | |
|---|---|---|---|
| Resto el la jaro 1936 | Kč 476.25 | Porto por la "Bulteno" . . . . . | Kč 298.60 |
| Membraj kotizoj . . . . . . . . . | Kč 572.-- | Porto por sekretario . . . . . . . | Kč 139.60 |
| Abonpago . . . . . . . . . . . . . . | Kč 255.50 | Papera por "Bulteno" . . . . . . | Kč 323.80 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Diversaĵoj . . . . . . . . . . | Kč 352.35 | Koloro por "Bulteno" . . . . | Kč 126.-- |
| | Kč 1656.10 | Matricoj po "Bulteno" . . . . | Kč 114.-- |
| | | Diversaĵoj . . . . . . . . . . . . . | Kč 372.80 |
| | | | Kč 1374.80 |

La liga presfondo estas notita inter diversaj enspezoj Kč 281.30

Raporto de bultena kompilanto k-do Schiller:
K-do Schiller sendis skriban raporton pri sia funkciado kun aldono de 10 punktoj por eventuala reakcepto de funkcio de liga kompilanto. La ĝenerala kunveno decidis, ke plej parte la ligo povus akcepti la punktoj sed ne ĉiuj, ĉar ni finance ne estas tiel fortaj.

Raporto de revizoro k-do Němec:
Li raportas ke trovis ĉion en ordo kaj proponas absolutorion al la komitata kiu estis unuvoĉe aprobita.

Ĉ.L.A.E. germanlingva organizo de unuigita ligo Ústí n.L. sciigas al la kunveno, ke intencos doni je ĝenerala kunveno de ĈLAE., okazonta dum junio proponon je likvidon de ĈLAE. Kaj samtempe sciigas al ligo la kondiĉoj por eventuala transigo de anoj al L.L.E. Plzeň. La ĝenerala kunveno decidis konsenti kunĉiuj 8 punktoj cititaj en la letero.
Sekvis tralego de alvenintaj salutleteroj kaj mallonga interrompo e la kunveno por ke havu la delegitoj sufiĉe da tempo por pli bone pritrakti la venontaj ligaj elektoj.
Post malfermo de kunveno estis unuvoĉe elektita jena nova komitato:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Oldřich Báša | grupo: | Plzeň – Peklo | prezidanto |
| Jaroslav Pelcman | " | Kulturo – Plzeň | I. viceprezidanto |
| Otto Dibelka | " | ĈLAE. | II. viceprezidanto |
| Richard Jonák | " | Plzeň – Peklo | sekretario |
| Václav Koc | " | Kulturo – Plzeň | protokolisto |
| Karel Reiter | " | Plzeň – Peklo | kasisto |
| Frënze Richter | " | ĈLAE. | vickasisto |
| Karel Fremr | " | Kulturo – Plzeň | raportanto |
| František Kalný | " | " " | kompilanto |
| Ladislav Proskovec | " | Plzeň – Peklo | vickompilanto |
| Františka Jonáková | " | " " | arĥivisto |
| Josef Pech | " | " " | sen funkcio |
| Jan Valeš | " | Kulturo – Plzeň | sen funkcio |

A n s t a t a ŭ a n t o j :

| | | |
|---|---|---|
| | Ant. J.Schiller, | ĈLAE. |
| | Ant. Vágner | Kuturo – Plzeň |
| | Václav Lenk | Plzeň – Peklo |
| | Václav Tolar | " " |
| Revizoroj: | | |
| | Matěj Němec | Plzeň – Peklo |
| | Marie Folková | Kulturo – Plzeň |

Raporto de k-do Jonák pri la 1a tutlanda kongreso de laboristaj Esperantistoj en Plzeň.: La kongreso okazos dum la "Komuna kultura tago," kiu estos fiksita je la 6. kaj 7. de aŭgusto 1938. La kongreskotizo por la partoprenantoj estas Kč 5.--. Por tiu ĉi kultura tago estas garantiigita 50% rabato je fervojo je ekspozicia legitimacio, kiu kostas /inkluzive enirbileto por la ekspozicio / Kč 8.--.
La ligo eldonos en la plejproksima tempo propagandan materialon por la kongreso. K-do Jonák raportis pri esperanta ekspozicio liu estos en la kadro de la VI. jubilea ekspozicio en Plzeň. La liga ekspozicio estos en la lernejo en strato Komenský, kie ni ricevis grandan ĉambron en la unua etaĝo. Ni jam kolektis sufiĉe da materialo, kiun ni ricevis plejparte el eksterlando. La ekspozicio daŭros preskaŭ tri monatoj. Gek-doj kiuj povas prizorgi taŭgan materialon el eksterlando por propagando, sendu ĝin.

Proponoj:
propono de k-do Schiller, Varnsdorf: La propono estis laŭ lia propra deziro muligita, ĉar estis sendita kun kondiĉo, ke ĝi estos efektivigebla nur tiam, se li estos reelektita kiel kompilanto kaj en lasta letero estis rimarkigo, ke estus pli bone, se ni elektos kompilanten el plzeňaj gek-doj.
Propono de k-do Breuer, Bratislava: Oni klopodi eldoni presitan "Bultenon", almenaŭ dumonate. Nunjare pro financaj kaŭzoj neebla.
Propono de sama k-doo: Klopodu fari pli efikan propagandon kaj eldonu flugfoliojn, kiuj estu sendotaj al ĉiuj laboristaj organizoj en Č.S.R. estis akceptita kaj laŭ financaj eblecoj nunjare plenumita.
Propono de sama k-do: Aranĝu propagandan rondvojaĝon de iu kapabla k-do tra Č.S.R., kiu propagandus en ĉiu urbo Esperanton. Nuntempe la financa stato de la ligo ne permesas efektivigi tion.
Propono de sama k-do: Plialtigu la kotizon de Kč 4.-- je Kč 10.--
Propono de plzeňaj sekcioj: La sekcioj pagu por siaj anoj, same kiel la izoluloj por jare 6.-- Kč. Lasta propono akceptita.
Propono de cekcio Plzeň-Kulturo: La "Bulteno" estu verkata plejparte en ĉeĥa lingvo. Malakceptita.
La "Finlanda Laborista Esperantista Asocio" Helsinki, deziras, ke la ligo sendu reprezententaron al la nunjara asocitago, aranĝita de supre nomita organizo en Tampere la 5. de junio. Neplenumebla pro nefavora financa stato.
La "Bulteno" estos eĉ nunjare eldonita kiel plimultigate kaj laŭ la financa stato ni eldonos ĝin 4 kaj kelkfoje eĉ 6 page. Ni klopodo eldoni la venontan jaron presitan "Bultonon", sed ni bezonas ĉefe pli grandan subtenon de liga presfondo, kiu estis pasintjare de nia anaro tre forgesita, ĉar alie tute ne estas ebla eldoni presintan gazeton de laboristaj esperantistoj en Č.S.R.
K-do Pech finis post la 12. hero la ĝeneralan jarkunvenon, kiu vere estis tre interesa, ĉar je niaj delegitoj estis videbla, kiel ili kun ĝojo laboras en nia laborista esperantista movado.

Richard Jonák t.t. sekretario.

- - - - - - % % % % % % - - - - - -

<u>El la liga sekretariejo:</u>

\+ D a n k o n : mi diras al ĉiuj kunlaborintoj, kiuj helpis al mi pli faciligi mian penigan laboron, kompilinte la "Bultonon" dum multaj jaroj, kaj petante, ke vi volu donaci la saman konfidon kaj kunlaboron ankaŭ al mia posteulo, mi salutas ĉiujn gekamaradoj emike kaj kamarade.

Ant. J. Schiller, Varnsdorf.

\+ Ĉu estus ebla inviti SAT-kongreson en la jaro 1940 al Plzeň: La sekretario de la ligo ricevis leteron de sekcio Plzeň-Kulturo, kies anoj estas ĉiuj organizitaj en SAT, ke ili intencas inviti SAT-kongreson en la jaro 1940 al Plzeň. En Plzeň estas nuntempe en SAT organizitaj 25 laboristaj esperantistoj, el kiuj estas nunjare 8 en la liga komitato, kiuj volus transpreni ĉiun preparan laboron por la kongreso. Ĉar LLE. Plzeň povus /kompreneble laŭ ilia opinio / per tiu ĉi kongreso profiti, ili proponas al ni, jam de nun fari ĉiuflankan propagandadon por SAT-kongreso en la kadro de LLE. Kaj pere de nia "Bulteno".
Ol la liga komitato pre traktos tiun ĉi proponon de sekcio Plzeň-Kulturo, ni volas unue aŭdi la opinion de aliaj anoj el aliaj lokoj. Ni petas vin sincere, skribu ĉiuj plej baldaŭ, por ke ni sciu, ĉu povos la liga komitato plenumi la postulojn de plzeňaj SAT-anoj aŭ ĉu tio neestas ebla.

\+ Por 1a presfondo sendis:
K-do Jozefo Balicky, Albrechtice, Kč 5.--
K-do A.Breŭer, Bratislava Kč 5.-- Kiu sekvos????

\+ Hodiaŭa "Bulteno" estas jam kompilita de nia nova kompilando k-do Kalný F., al lia adreso: Božkov u Plzně, Na Libušíně 229, sendadu la materialon por "Bulteno". En lasta komitata kunveno estis elektita redakcia rondo, kiu konsistas k-doj Kalný, Proskovec, Báša, Jonák kaj Pelcman. La redakcia rondo estonte pritraktos ĉiujn artikolojn kiuj aperos en la liga "Bulteno". Kunveno de redakcia rondo okazor ĵaŭde la 19an de majo je oka horo vespere en "Kulturo".

\+ Kamaradoj, propagandu la I. tutlandan kongreson de laboristaj esperantistoj okazonta 6. kaj 7. de aŭgusto en Plzeň kaj ekspozicio. Anoj, kiuj ankoraŭ ŝuldas kotizon, aŭ abonpagon por kuranta jaro estas petataj plej baldaŭ ordigi siajn aferojn.
La adreso de ligo restas kiel ĝis nun: Laborista Ligo Esperantista Plzeň-Peklo.

\- - - - - - % % % % % % - - - - - -

\+ La unun junularsemajno en Nederlando.

La Federacio de Laboristas Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo aranĝos kampsemajnon por infanoj de la 12 ĝis 18 jaroj kiuj kontentige kapablas uzi Esperanton. La tendaro estos konstruata sur la - en Nederlando – konata kamptereno Doorn-Aŭsterlitz-Maarn. Sporto, kantoj, ludoj, promenadoj sur vasta erikejo kaj arbaroj formas la programon.
Nederlandaj infanoj pagas fl. 3.-- sen vojaĝkostoj. Anoncu vin al: k-dino A.C.Obbes, Boetemlaan 24 b, Rotterdam Noord, Nederlando.

\+ Nova Sokola informilo.
Luksan prospekton, broŝureton 12paĝan /19 x 21 cm/, bele ilustritan pri la Sokola Gimnasta Kongreso en Praha 1938, ĵus eldonis Ministerio de Komerco. - - Niaj eksterlandaj legantoj petu ĝian senpagan alsendon ĉe Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo Praha XIX, Uralská 9.

Lingva batalo
En tempoj de Aesop parolis bestaro,
Kulture simila al la homaro;
sed iam ili decidis pri tio:
" la raso estu pli alta el ĉio "
Ree murmuri la urso aspiris,
hurli denove la lupo deziris;
" mi emas bleki " la ŝafo diris;
nur bojanton la hundo admiris.
Tiel finfine ili brutiĝis
kaj la kulturo ree bestiĝis
Fr. Grillparzer.

Famuloj laŭdegis Esperanton – kaj ne lernis ĝin. Sed simpluloj ne nur lernis la lingvon, sed ĉiutage praktikas ĝin. Per tiu laboro ĉi lastaj faras pli por la unueciĝo de l´homaro ol la unuaj.
V a r b u p o r 1 a L. L. E. kaj ĝia organo.